

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Giovanni Papini, Kristo en nia tempo. — Peter Klein, Sankta Meso por la paco. — Walter Mudrak Alois Norbert, Al la soviniistoj. — Wilhelm Solzbacher, Blaj, la rumana Romo. — Pastro Georges Ramboux, La paco en danĝero. — Sklaveco de infanoj en la soveta paradizo. — Internacia Junulara Agado (Katolika Junularo — Protestantana Junularo — La Skoltoj — Universitata Junularo — Socialista Junularo — Pacifista Junularo — Komunista Junularo — Liberpensula Junularo — Fasisista Junularo). — Gravaj Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1931. — Msgr. Paulin Ladeuze, La senco de la Katolika Agado. — Nia Movado. — Sur nia libro: Aldono (germanlingva) : Die katholische Jugend lernt Esperanto!

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Abonprezoj de "La Juna Batalanto,"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	2 s 4 p	3 s	1 s 3 d	Hungarujo	2.4 p	4 p	2 p
Argentino	1.50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	2 s	3 s	1 s 3 d	Japanujo	2 s	3 s	1 s 3 d
Aŭstralio	2 s	3 s	1 s 3 d	Jugoslaviujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3.40 s	5 s	2 s	Litovujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3.50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0.50 dol	0.75 d	0.30 d
Cehoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1.25 fl	2 fl	0.80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4 z l	6 z l	3 z l
Danzig	2 g	3 g	1.20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1.20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50 dr	15 dr	Svisujo	2.50 fr	4 fr	1.50 fr
Hispanujo	3 p	4.50 p	2 p	Usono	0.50 dol	0.80 dol	0.30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevas ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Poŝtkontoj. Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).

ESPERANTO EN LA SERVO DE LA INTERNACIA KATOLIKA AGADO!

Katolikajn informojn el la tuta mondo

rapide havigas al vi la dusemajna, grandformata, riĉe ilustrita gazeto KATOLIKA VIVO. Direktoro : Pastro Georges Ramboux, Paris.

La internacia katolika junulara kaj paca movado

eldonas por vi sian riĉenhavan, vivece verkitan, kuraĝe batalantan dumonatan organon LA JUNA BATALANTO. Redaktoro : D-ro Wilhelm Solzbacher, Köln.

Kombinita abono al Katolika Vivo kaj La Juna Batalanto

kostas por tuta jaro 6.— RM., por duona jaro 3.— RM. Oni pagas al **Eldonejo La Juna Batalanto, Dr. W. Solzbacher, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo** aŭ al la Poŝtkontoj sciigataj sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu gazeto. Banknotoj, ĉekoj, poŝtmandatoj, respondkuponoj, UEA-kuponoj ktp. estas akceptataj.

NOTU la novan komunan adreson de la Internacia Oficejo de MOKA kaj de Redakcio kaj Administracio de LA JUNA BATALANTO: Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

Kristo en nia tempo

De Giovanni Papini.

El la mondkonata « Historio de Kristo » de Giovanni Papini, kiu ĵus aperas en Esperanto-aldono 600-paĝa (Eldonejo A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italujo, prezo broŝ. it. L. 40,—, tolbind. it. L. 50,—), ni represas du pagojn, rekomendante tiun majstran verkon al ĉiuj niaj legantoj.

Kristo ankoraŭ ne estas forpelita el la tero.

Lia rememoraĵo estas ĉie. Je l'muroj de la preĝejoj kaj de la lernejo, sur la pintoj de la sonorilaj turoj kaj de la montoj, en la niĉoj de la stratoj, ĉe la litkapo kaj sur la tomboj, milionoj da krucoj rememorigas la morton de la Krucumito. Elskrapu la freskojn en la preĝejoj, forportu la pentraĵojn el la altaroj kaj el la domoj : la vivo de Kristo plenigas la muzeojn, la artgaleriojn. Enjetu en la fajron meslibrojn, brevierojn kaj eŭkologojn, kaj vi retrovos Lian nomon kaj Liajn vortojn en ĉiuj literaturaj libroj. Mem la blasfemoj estas nevolaj rememorigo de Lia ĉeesto.

Kion ajn oni faros, Kristo estas fino kaj komenco : abismo de diaj misteroj meze de du partoj de l'homa historio.

La Nacieco kaj la Kristaneco neniam povos kunlutiĝi. Antaŭ Kristo kaj post Kristo. Nia epoko, nia civilizacio, nia vivo komencas per la naskiĝo de Kristo. Tion, kio okazis antaŭ Lia veno, ni povas serĉi kaj pri ĝi sciigi, sed ĝi ne plu estas nia : ĝi estas signita per aliaj ciferoj, ĝi estas en la kadro de aliaj sistemoj, niajn pasiojn ĝi ne plu ekscitas : eble ĝi estas bela, sed ĝi mortis. Cezaro en sia tempo plimulte famiĝis ol Jezuo, kaj Platono instruis plimulte da sciencoj ol Kristo. Ankoraŭ nun oni parolas pri la unua kaj la dua, sed kiu entuziasmiĝas nun por aŭ kontraŭ Cezaro, kie troviĝas nuntempe la por- kaj kontraŭplatonaj?

Kontraŭe Kristo ĉiam vivas en ni. Estas ankoraŭ homoj, kiuj Lin amas aŭ malamas. Estas pasio por la Pasio de Kristo kaj alia por ĝia detruo. Kaj tiu ĉi persisto por Lia mortcelado diras, ke Li tute ne mortis. Tiuj samaj personoj, konsumiĝantaj por nei Lian doktrinon kaj Lian ekziston dum tuta vivo, rememorigas Lian nomon.

Ni vivas en la Krista epoko, kaj ĝi ankoraŭ daŭras. Por kompreni nian mondon, nian vivon, nin mem, ni devas komenci de Li. Ĉiu epoko devas reverki sian Evangelion.

Neniu epoko vivis tiom malproksime de Kristo kiom la nia kaj Lin tiom bezonis. Sed por Lin trovi ne sufiĉas la malnovaj libroj.

Neniu vivo de Kristo, eĉ se ĝin verkus iu genia aŭtoro, la plej altvalora en la mondo, povus superi, laŭ beleco kaj perfekteco, la Evangeliojn. La naivan sobrecon de la unuaj kvar historiistoj neniam povos superi ĉiu stila kaj poezia mirigaĵo. Kaj tre malmulte ni povas aldoni al tio, kion ili diris.

Sed hodiaŭ kiu legas la Evangeliojn? Ĉiu generacio havas siajn priokupojn kaj pensojn — kaj siajn frenezajojn. Estas necese, retraduki por la devoĵigintoj la malnovan Evangelion. Por ke Kristo ĉiam estu vivanta en la vivo de l' homoj, eterne ĉeestanta, estas necese, Lin revivigi de tempo al tempo, ne certe por Lin surkolorigi per laŭmodaj koloroj, sed por denove reprezenti per novaj vortoj — kaj rilatigi al la nuntempa vivo — Lian eternan veron, Lian neŝangeblan historion...

SANKTA MESO POR LA PACO.

Imitinda ekzemplo de niaj amikoj el Essen.

Ĉiulande oni povas konstati, ke la movado kontraŭ la milito, tiu « terura skurĝo de la homaro » (Benedikto XV-a), plifortiĝas. Ni memoru la alvokon de la katolikaj unuiĝoj de Francujo « La katolikoj volas la pacon » en aprilo de tiu ĉi jaro kaj la klopodojn por aranĝado de sanktaj mesoj por la paco en ĉiuj landoj. Post la bonega agado de la Parizaj katolikoj nun ankaŭ en Essen (Germanujo) oni en simila maniero agadas por la pacigo de la mondo. La katolikaj unuiĝoj porpacaj (inier ili ankaŭ la MOKA-grupo) kune kun la Komitato por Katolika Agado, en kiu estas reprezentataj ĉiuj katolikaj unuiĝoj de Essen, publikigis en la loka gazetarō jenan alvokon:

SANKTA MESO POR LA PACO!

Deksep jaroj pasis depost tiu la de aŭgusto, kiam la popoloj de Eŭropo ŝanceliĝis en la teruran okazintajon de l'mondmilito; preskaŭ dektri jaroj ni vivas en paco, kiu estas « pli ŝajno ol realeco », kaj « kreskas la timo pri novaj, pli teruraj militoj ». Konsiderante tiun ĉi danĝeron, gvidantaj geviroj klopodas pri interkompreniĝo de la popoloj, sed unuavice la kompetentaj gvidantoj de la katolika popolo, la posteuloj sur la Seĝo de Sankta Petro, ĉiam denove admonis en saĝa prudento gvidantojn kaj kunlandanojn, registarojn kaj popolojn al paco, kaj montris la vojojn, per kiuj pacigo de la mondo estas atingebla.

Rigardante la venontjaran konferencan pri malarmado ni memoras la vortojn de Leono XIII-a, ke « grandegaj armeoj ne havigas certan ripozon », kaj ke « la armata paco estas preskaŭ same ruiniga kiel la milito mem ».

Meze de la milito Benedikto XV-a alvokis la militantajn popolojn « anstataŭ la potencon de la armiloj per la morala forto de la justeco. Kun tio okazu justa kompreno de ĉiuj pri la samtempa kaj reciproka malarmado ». Kaj post fino de l'mondmilito li atentigas je « la de ĉiuj ekkonata neceseco zorgi per ĉiuj tortoj por forigi aŭ malgrandigi la armeŝarĝon, kies kolosan premon la ŝtatoj ne plu povas toleri ».

Pio XI-a proklamis la devizon « Pax Christi in Regno Christi », kaj lia encikliko de Kristnasko 1922 estas dediĉita al efektiviĝo de tiu postulo. Paskon 1930 li nomis abomeninda kaj murdema tiun nacian, kiu ankoraŭ hodiaŭ havas militajn pensojn.

Kun la germanaj episkopoj ankaŭ ni bedaŭras: « La mondo ne povas forlasi la venenitan atmosferon de l' milito, ne povas decidi malarmadon de la milionarmeoj kaj malŝparas ankoraŭ nun tempon kaj monon provizante sin je pli teruraj detruiloj kaj murdinstrumentoj ».

Ni katolikoj, kiuj ne pensas alie ol niaj gvidantoj, volas kunlabori je la efektiviĝo de la mondpaĉo. Tial ni postulas, ke la popoloj fine serioze komencu la reciprokan malarmadon.

Tamen ekion utilas al ni paco, kiu nur estas ekstera, ne pli ol formo por la reciprokaj rilatoj. Ni bezonas pli multon, pacon, kiu eniras la korojn, ilin influas kaj favorigas al fraterna bonvolo. kie alie tiu paco estas trovebla ol en tiu, kiu nin instruis: « Vi ĉiuj estas fratoj ! »

Tial katolikaj paĉifistoj de diversaj landoj ĉiumonate festas sanktan meson por la paco. Multaj promesis komunii la unuan dimanĉon de ĉiu monato por preĝi por la paco de la mondo kaj la interkompreno de la popoloj. Ankaŭ ni katolikoj de Essen volas same agi, kaj festi sanktan meson por la paco, unufoje dimanĉon, la 6-an de septembro 1931, je la 8-a en la preĝejo Naskiĝo de Nia Sinjorino, kaj memori, ke ni katolikoj de diversaj landoj, malgraŭ la amo kaj fideleco, kiujn ni havas al nia propra ŝtato, formas en Kristo unu grandan familion sub lia anstataŭanto, la Sankta Patro en Romo. Precipe ni kore invitas ĉiujn germanajn sankredanojn en Essen al partopreno.

« Per Kristo al mondpaĉo » estu nia devizo.

Essen, Aŭgusto 1931.

Komitato por Katolika Agado:
La prezidanto,
Dro Fischer.

Paĉligo de Germanaj
Katolikoj.

Mondjunularo Katolika
(MOKA)

Internacio Katolika
(Ika).

En la sankta meso, kiu ĝustatempe okazis, partoprenis preskaŭ mil personoj, el kiuj granda parto ricevis la sanktan komunion. Post la meso okazis komuna matenmanĝo en la granda salono de la « Katolika Domo ». En la sama salono ankaŭ la loka grupo de Mondjunularo Katolika organizis ekspozicion pri ĝia laboro kaj pri la uzado de Esperanto inter Katolikoj. La ekspozicio trovis grandan aplaudon.

Peter Klein.

AL LA SOVINISTOJ.

De Walter Mudrak, Esperantigis Alois Norbert.

Vi povas ja gloregi vin
Per militado laŭ bezonoj,
Sed nomu ne « kristanoj » vin,
Dum vi predikas per kanonoj.
Batalu laŭ deziro vi
Laŭ idolanoj en estinto,
Laŭvole verŝu sangon vi,
Sed vi silentu pri l' Savinto!

Konvinke jen ja la turkar'
Por la Alaho bataladas,
Sed regas ne plu Odin, ĉar
Ne l' dioj de l' Valhal' vivadas.
Restadu laŭ inklino vi,
Sed estu nepraj ideanoj —
Kondamnas hipokriton mi
Kaj militemon de l' kristanoj!

BLAJ, LA RUMANA ROMO.

En Braŝov, la laborema urbo je la piedoj de la Transilvaniaj Alpoj, mi eniris la vagonaron, kaj kiel paŝita sago la « Rapid Ardeal » tontris tra la valoj de Transilvanio. En la riveroj, kiuj nun dum la somera varmego estis preskaŭ sekaj, ripozis centoj da bovoj kaj bubaloj, bubaloj kun sovaĝa aspekto kaj malsovaĝa sento, kaj kelkfoje mi preskaŭ imagis, esti en tre malproksima Suda Afriko. Kaj tamen mi estis nur en Rumanujo, en la rapidvagonaro București-Cluj-Oradea Mare.....

Mi rigardis la vilaĝojn kaj provis diveni en ĉiu kazo, ĉu la vilaĝo estas rumana, hungara aŭ germana. Kaj mi repensis pri la terura problemo de la nacioj en tiu lando. Kun rumanoj, hungaroj, germanoj, rusoj, ukrainoj, serboj, armenoj kaj judoj mi estis parolinta dum mia kelksemajna restado, kaj ĉiuj estis plendintaj al mi..... pri la aliaj. Malfeliĉa nekompreno kaj malkonfido!

Mi venis de vizitoj al hungaroj kaj germanoj kaj mi estis survoje al unu el la plej gravaj centroj rumana, eĉ al la plej grava laŭ la kultura kaj katolika vidpunktoj: al Blaj, sidejo de la greko-katolika metropolitano de Rumanujo, de kie ĉiam denove eliris la voko al reunuiĝo de la rumana popolo kun Romo kaj la Trono de Petro.

La rumana popolo apartenis iam al la katolika kredo kaj uzis en la liturgio la latinan riton. La fatala sorto de la nacio estis, ke ĝi sub la influo de Bizancio enfalis en la skismon kaj perdis la kontakton kun Romo. Kaj ĝi perdis ankaŭ dum kelka tempo ĉiun nacian liberecon kaj kulturon. En la princlandoj de Moldavio kaj Valakio ĝi estis sub la hegemonio de la grekoj (preskaŭ ĉiuj rumana skisma episkopoj estis grekoj), en Transilvanio sub la regado de plej grandparte protestantaj-kalvinistaj hungaroj. Kaj dum kiam la armeoj de Mircea, Stefanu-cel-Mare kaj Mihai-Viteazul repuŝis la atakojn de la musulmanaj invadantoj, la rumanoj mem estis tute senigitaj de la influo de l'okcidenta civilizo, kiun ili savis. Fine en 1700 okazis io, kio donis novan eblecon al kreskado de rumana nacia kulturo. Granda parto de la rumanoj en Transilvanio reunuiĝis kun la Katolika Eklezio de Romo, gardante sian bizantiuman liturgion kaj rumanan liturgian lingvon. Kaj per la helpo de Romo kaj la aŭtoritato de la Katolika Eklezio, ankaŭ rilata al la hungara ŝtato, estas fonditaj 1754 la unuaj superaj lernejoj en Blaj, kiuj fariĝis la veraj edukantoj de la rumana popolo. En la 175 jaroj de sia ekzisto la lernejoj de Blaj donis al elito de preskaŭ 100 000 rumanoj ilian edukon kaj sciencan formadon. La profesoroj unue estis monaĥoj studentaj en la universitatoj de Romo kaj Vieno. Depost la komenco de la 19-a jarcento ili estas anstataŭitaj per la neordena pastraro. Blaj estas la vera lulilo de la rumana nacia kulturo. Kiam cent jarojn poste la ortodoksaj rumanoj ankaŭ malfermis lernejojn, iliaj unuaj profesoroj estis iamaj studentoj de Blaj. Multaj famkonataj rumanoj estis instruitaj en la lernejoj de Blaj. Inter ili estis: Sincai, Maior, Micu, Cipariu, patro de la rumana filologio, Barnutiu, la apostolo de 1848, Britiu, Eminesco, Moldovanutiu, Bunea, Bianu, nuna prezidanto de la Rumana Akademio, Maniu, estinta ĉefministro. Blaj, rumana Romo, Blaj, lulilo de la rumana kulturo.....

Mia vagonaro haliis en Blaj, kaj apenaŭ mi estis elirinta, kiam min jam alparolis la afabla pastro sekretario de la ĉefepiskopo. Li komplimentis min en veturilon, la ĉevaloj ektiris, — kaj jam mi veturis tra la stratoj de Blaj, pri kiuj mi antaŭe estis revinta.

Blaj ekstere ne aspektas kiel mondama metropolo, sed kiel simpla sudlanda vilaĝo. Sur la stratoj promenas trankvile bovoj, porkoj kaj gekokoj, kaj eĉ la ĉefplaco ne estas alia ol granda kamparana foirejo.

Sed ekzistas kelkaj konstruaĵoj, kiuj faras rimarkindan escepton. La unua estas la katedralo. Ĝi havas ikonostazon (grekitan sanktulbildaron antaŭ la altaro), kiu estas unike bela. En la katedralo mi havis okazon, ĉeesti la sanktan ĉefliturgion en unu el la plej altaj festoj de la greka Eklezio: en la tago de la Altigo de la Sankta Kruco. Oni eĉ invitis min, surgeni tute antaŭe en la fiorejo inter la kanonikoj. Kaj mi denove admiris la belecon de la liturgio de Sankta Joannes Chrysostomus, kiun mi jam konis en greka kaj slava lingvoj, sed nun unue aŭdis rumane. Kaj same mi admiris la profundan, kvankam naivan, religian senton de la rumana popolo.....

Kaj la dua escepto estas la famkonataj lernejoj: krom la popollernejoj du seminarioj, du liceoj, du Lernejoj por preparado de geinstruistoj, du lernejoj por komercaj studoj. La lernejoj ĝuas la specialan simpatian de la Sankta Patro, kiu ankaŭ mone subtenis ilin. Interesa estis al mi speciale la Malgranda Seminario, kiu estas gvidata de la Asumpcionistaj Patroj. Ilia domo estas tute internacia: inter la pastroj estas unu franco, unu belgo kaj unu anglo, la laika frato estas rumano. Du el la patroj akceptis la grekan riton, la tria ankoraŭ studas ruman lingvon kaj preparas sin ankaŭ al transiro. Dum kiam mi, trinkante tason da kafo, babiladis kun ili mi rimarkis la profunde apostolan fervoron, kiu pelis tiujn okcidentajn pastrojn, iri al tiu fronto de la militanta Eklezio, kiu urĝe bezonas tian helpon: al la katolikoj orientitaj. Ili faras tion saman, kion inter la ukrainoj faras la nederlanda pastro Peridon, kies gasto mi estis estinta kelkajn semajnojn antaŭe en Lwow. — Interesa ankaŭ estas la Granda Seminario, en kiu mi loĝis. Ĝia tiama direktoro estis la eksterordinare klera kaj lingvo-sperta Msgr. D-ro Alexandru Rusu, kiu baldaŭ poste fariĝis episkopo de Mara-mureŝ. Lia granda sperteco, lia bonega kono de rumanaj kaj eksterrumanaj aferoj kaj lia bona humoro ĉiam restos en mia memoro. Tre varia estis la rondo, kiu vespere kaj tagmeze renkontiĝis ĉe la tablo de la seminario. Ĉar en la interparolado kun la diversaj profesoroj kaj kanonikoj montriĝis la problemo de la lingvoj. Ĉiu estis lerninta alian lingvon, tiel ni interparoladis itale, france, germane, angle, ruse, kaj mi plene eluzis ankaŭ miajn modestajn konojn de la rumana lingvo. Laŭ ĝenerala deziro mi faris paroladeton en Esperanto, por montri la belsonecon de la helplingvo.

En la vico de la rimarkindaj konstruaĵoj de Blaj oni sendube vane serĉas alian domon: la palacon de la metropolitano. Vere la ĉefo de la rumanaj katolikoj grekriaj ne posedas palacon. Li loĝas en simpla kaj modesta domo. Neion li elspezas por persona lukso, ĉion li ŝparas por siaj amataj lernejoj. Iam li diris, ke li estus preta, iri de pordo al pordo, por almozpeti la necesan monon por siaj lernejoj institutoj. Li mem estas granda sciencisto, kaj lian kompetentecon en teologio admiras multaj ortodoksuloj kaj multaj eksterrumanaj fakuloj, kaj ĝin oni bone konas kaj multe ŝatas ankaŭ en Romo. Monsignore Suciŭ, ĉefepiskopo de Alba Iulia kaj Fagaras, metropolitano grekokatolika de Rumanujo, estas trege simpatia homo, kaj neniam mi forgesos mian preskaŭ unuhoran itallingvan interparoladon kun li, en kiu li volonte respondis miajn multajn demandojn kaj aŭskultis mian raporton pri la MOKA-movado.....

Kaj mia fina konkludo, kiam mi forvojaĝis de Blaj, por iri al Aŭŝa Julia, vizitante nian karan episkopan protektoron de MOKA Monsignore Majlath?

Por konsciiĝi pri la plej profunda kaj plej vasta kaj plej universala senco de nia Eklezio, estas necese, ke ni lernu kompreni ĝin en la varieco kaj riĉeco de ĝiaj formoj, ritoj kaj spiritaj sintenoj. Ni devas koni kaj kompreni niajn katolikajn fratojn en la orientitaj landoj. Kaj por tio estus utile kaj valore, ke ekzistu kiom eble plejmultaj personaj rilatoj inter junaj katolikoj de tiuj landoj kaj de la okcidentaj nacioj, rilatoj, kiuj helpus nin, fariĝi pli komprenemaj, pli universalaj en nia rigardado, volado kaj sentado, pli..... katolikaj. Ĝis nun malmulte estas farita. Vasta tasko atendas. Ni devas komenci.....

Wilhelm Solzbacher.

LA PACO EN DANGERO.

Sekve de malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj, en preskaŭ ĉiuj Europaj landoj kaŭzigitaj per fiaskanta kapitalista sistemo, la homspiritoj estas nuntempe pli malpli nerve streĉitaj. Estas fulmo en la aero. Naskiĝu unu fajrero, kaj la tondro eksplodos!

Tondro estas ĉiam kataklismo por la popolamasoj: hommortado, bienruinigo ktp. Sed el ĝi scias akiri profiton iaj homoj. Kaj tiaj nun ree klopodas ĉiuforte naski la fajreron, kiu eksplodigos la tondron, reokazigos militon.

Oni devas rekonii, ke ĝenerale la registaroj nunaj ne deziras militon. Ankaŭ la intelektaj elitoj ne volas militon; ili eĉ klopodas por plifirme starigi pacon. Sed kio ebligas militon, tio estas ia ekscitiga stato de la popolo. Kaj tiu ekscitigita popolstato estas kaŭzebla pere de la gazetaro.

Tial en multaj ekstremaj ĵurnaloj, ĉu sovetaj, ĉu naciistaj, de kelka tempo aperas tendencaj artikoloj, falsaj aŭ duonfalsaj informoj, maljustaj rakontoj, kies nura celo estas ĵeti homojn kontraŭ homoj, naciojn kontraŭ nacioj.

La katolika gazetaro estas pli malpli sklavo de la internaciaj presagentejoj, kiuj estas en la potenco de la militprofitemuloj. Kaj tiuj presagentejoj disvastigas kompreneble nur informojn utilajn al la celo trafenda. Necese estus havigi pli da sendependeco al la katolika gazetaro, por ke ĝi almenaŭ sciu la pacajn klopodojn en diversaj landoj faritajn. Necesa estas internacia informilo sendependa!

Nia internacia Esperanto-organo klopodu esti tiu pacherooldo, kiu sciigante la ammotivojn, dissemos pli kaj pli da kristana karitato en la korojn kaj saviga lumo en la mensojn. Tiam la paco malpli estos en danĝero!

Georges Ramboux, presbitero.

Grava rimarko. Ĉi tiu artikolo estas premita el la lasta numero de la bela, grandformata, ilustrita 14-taga gazeto «Katolika Vivo». Tiu numero estis speciale dediĉita al la katolika paca ideo, kaj la artikolo de la redaktoro bonege montras, kian rolon povus plenumi «Katolika Vivo» per fidinda internacia informado katolika, se — ĝi trovus la helpon de ĉiuj seriozaj katolikaj Esperantistoj. Bedaŭrinde tiu helpo venas multe tro malrapide. LA JUNA BATALANTO per speciala interkonsento ebligis je tre favoraj kondiĉoj kombinitan abonon je JUNA BATALANTO kaj KATOLIKA VIVO. Nur 6.— RM. por tuta jaro aŭ 3.— Reichsmark por duona jaro vi bezonas pagi por regule ricovadi tiujn du gazetojn. Kial niaj amikoj tiel malrapide venas, por profiti tiun okazon kaj subteni vere seriozan internacian agadon katolikan per Esperanto?

Sklaveco de infanoj en la soveta paradizo.

La bolŝevista revuo «Por komunisto kulturo» skribas: «155 distriktoj de la centra provinco de Ĉernoziom decidis starigi dum la somera libertempo «interligitecon» inter la sovetaj kolektivmastrumoj kaj la lernantoj de la lernejoj. Ĝis la 1 septembro la lernantoj devos labori en la «kolĥozoj» en grupoj de 100-200». La revuo aldonas, ke la malamikoj de la laborista klaso kaj la anoj de la religiaj sektoj faras furiozan propagandon kontraŭtiu decido kaj penas ribeligi la gepatrojn. (1)

La ĵurnalo «Segodnia» de Riga informas, ke sekve de amasaj puntransportoj el soveta Ingermanlando (rusa regiono ĉe la estona kaj fmlanda limoj) tie montriĝis granda manko de laboristoj, speciale por la fosado de torfo kaj por la laboro en la grenkampoj. Por helpi tiun mankon, la ŝtataj aŭtoritatoj sendis tien milojn da senlaboruloj, sed ĉar tio ne sufiĉis, oni dekretis «labormolilizon» de ĉiuj lernantoj, sen respekto pri la aĝo aŭ la taŭgeco por tiel malfacilaj laboroj. La infanoj do devas sklave labori en la «kolĥozoj» (kolektivmastrumoj). (2)

(1) Por Komunisto Kulturo, n-ro 154, 1931.

(2) Segodnia, Riga, 23 julio 1931.

POR LA MILITO oni bezonas tri aferojn: 1. monon, 2. monon, 3. monon! Ankaŭ la batalo por la paco kostas nonon! Helpu! Abonu kaj varbu! Fariĝu membro de MOKA! Donacu por la Jubilea Kolekto!

Internacia Junulara adago.

KATOLIKA JUNULARO.

Internaciaj interparoladoj de katolikaj junulargvidantoj en Bruxelles. La nunjara grande kongreso de la Belga Katolika Junulara Asocio, kiu okazis 29-30 aŭgusto en Bruxelles kaj kiun partoprenis pli ol 100 000 junuloj, je kiu ĉeestis la Kardinalo-Primo, la Papa Nuncio, preskaŭ ĉiuj belgaj episkopoj, la ĉefministro, la katolikaj ministroj kaj multaj katolikaj gvidantoj, troviĝis en tute internacia kadro laŭ la speciala deziro de la aranĝintoj. Ĉeestis delegitoj el katolikaj junularaj asocioj de Anglujo, Armenujo, Belgujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Hinujo, Irlando, Italujo, Kanado, Litovujo, Luksemburgo, Meksiko, Nederlando, Polujo, Portugalujo, Rumanujo, Svisujo, krome de jenaj internaciaj asocioj: Internacia Ligo de Katolika Virina Junularo, Katolika Junnetaista Unuiĝo kaj Mondjunularo Katolika (MOKA). Por ili okazis la 31 aŭgusto kaj 1 septembro speciala internacia konferenco, kies ĉefaj temoj estis la agado de la *kristana laborista junularo* kaj la problemoj de *sporto kaj amuzoj en la katolika junularo*. La komparo inter la situacio en diversaj landoj estis tre interesa kaj fruktodona. La partoprenantoj ankaŭ vizitis komune kelkajn centrojn de la katolika junularo en Louvain kaj Bruxelles kaj iris al Malines (Mechelen), kie ili estas akceptitaj de la kardinalo-ĉefepiskopo, kiu atentigis en siaj afablaj salutvortoj pri la graveco de la internaciaj rilatoj de la katolika junularo por certigo de vera kaj daŭra mondaco laŭ la programo de nia Sankta Patro «Pax Christi in Regno Christi». — Ankaŭ kelkaj partoj de la Belga Junulara Kongreso havis jam tute internacian karakteron. Tio estis speciale vera pri la Generala Kunveno de la Kristana Laborista Junularo (Jeunesse Ouvrière Chrétienne, J.O.C.), kie multaj parolantoj kaj ankaŭ la admirinda apostolo de la kristana laborista junularo, Pastro Cardijn, elparolis konfesion je la internacia solidareco de la katolika laborista junularo. El nia MOKA partoprenis la Bruselajn solenojn la internacia sekretario, la germana nacia sekretario kaj la svisa nacia sekretario.

Internacia Ekspozicio de la Katolika Junularo en Bruxelles. Interesa kaj impona estis la Ekspozicio, kiu fariĝis unuaklasa sukceso. Tie vere montrigis la vicleco kaj varieco de la katolika junulara agado ĉiulanda. Partoprenis asocioj el Belgujo, Francujo, Polujo, Germanujo, Litovujo, Svisujo, Hispanujo, Luksemburgo, Meksiko; internaciajn ekspoziciojn montris la Katolika Junnetaista Unuiĝo (Kolping-Societo) kaj Mondjunularo Katolika (MOKA).

La Junulina Sekcio de la Internacia Katolika Virina Ligo havis fine de julio kunsidon de sia internacia komitato en Warszawa, Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Usono estis reprezentitaj. La Ligo okupiĝos estonte ankaŭ pri la interkompreniga laboro. Oni esprimis sian specialan simpatian al la itataj fratinoj, kiuj tiom suferas sub la faŝista subpremo. Internacia penta komunio estas organizita.

Katolika Junnetaista Unuiĝo (Gesellenverein). La ĉefsekretario Pastro D-ro Nattermann vojaĝis al Sudameriko, por ankaŭ tie viziti la lokajn unuiĝojn. La Junnetaista Unuiĝo komencis konstantajn rilatojn al la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj kaj al la Internacia Labor-Oficejo en Genève. La eldono 1932 de la «Kolping-Kalendaro» enhavas i. a. artikolojn «La Junnetaista Unuiĝo kiel Internacio» kaj «Por kio Esperanto?».

PAX ROMANA sukcese finis sian jubilean kongreson en Friburgo (Svisujo), 20-26 julio, kiun partoprenis delegitoj el la tuta mondo: Anglujo, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo (ĉeĥa, slovak, hungara asocioj), Francujo (FFEC, JEC), Germanujo (KV, UV, HV, VkdSt), Hungarujo, Irlando, Jugoslavujo (kroata kaj slovena asocioj), Luksemburgo, Nederlando, Polujo (pola kaj ukraina asocioj), Rumanujo (hungara asocio), Svisujo (StV, RV); ne reprezentante asociojn, ĉeestis studentoj el Afriko, Hindujo, Hinujo kaj Koreo. La ĉefparoladoj estis pri «Universitato kaj Kulturo» (Prof. P. de Munynek O. P., Fribourg), «Universitato kaj Internacia Vivo» (Prof. Habekki, Warszawa) kaj «La Katolika Universitato» (Prof. von Hildebrand, München). Oni kritika, ke la unua parolado estas akceptita sen ia diskutado kaj ke la diskutado de la du aliaj partoprenis nur profesoroj. — Novaj akceptita en PAX ROMANA estas la Asocio de la Ukrainaj Katolikaj Studentoj «Obnova» (Polujo). Specialan laŭdon meritas la pola delegitaro, kiu konsentis la akcepton de la ukraina asocio. La prezidanto estas elektita el Anglujo, en tiu lando ankaŭ okazos la sekvonta kongreso de Pax Romana. Oni akceptis unuanime rezolucion, kiu postulas de la registaroj veran kaj efikan malarmadon. En Fribourg partoprenis oficialaj delegitoj de la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj kaj de la Internacia Studenta Servo. Kvar gvidantoj el Pax Romana partoprenis la konferencon de la Internacia Studenta Servo en Ameriko, kelkaj el ili faros paroladojn en amerikaj universitatoj, kaj oni esperas, ke per tio estos ebla, gajni la membrecon de la amerikana katolika studenta asocio por Pax Romana. PAX ROMANA nun jam ekzistas 19 jarojn kiel internacia unuiĝo de la katolikaj studentaj asocioj. Ankoraŭ ne ĉiuj krizoj estas venkitaj, sed ŝajnas, ke pli kaj pli la movado venas en pli solidan kaj profundan laboradon.

Internaciaj kunvenoj de katolikaj universitataj studentoj en la formo de amikaj limkunvenoj estas preparataj por proksimaj datoj. Unu okazos en ĉi tiu aŭtuno en Nederlando kun ĉeesto de nederlandoj, flandraj kaj germanaj studentoj, kaj alia estos je pasko en Luxembourg por luksemburgaj, francaj, germanaj kaj nederlandaj studentoj.

Mondjunularo Katolika (MOKA) povis en ĉi tiu somero efike kunlabori en kelkaj internaciaj konferencoj, partopreni per multe admirata sekcio en la Internacia Ekspozicio de la Katolika Junularo en Bruxelles, gajni novajn simpatiojn kaj kunlaborantojn por Esperanto kaj servi en multaj manieroj la interkonatiĝon de katolikaj gejunuloj el multaj landoj.

Die katholische Jugend lernt Esperanto.

Die Geschichte vom Esel.

Ein Geistlicher aus Rumänien, der von seinem Bischof, einem eifrigen Förderer der Esperantobewegung, für die Propaganda der Welthilfssprache freigestellt worden ist, wurde bei einer seiner Werbereisen in England einmal von einem Zeitungsreporter interviewt und erzählte ihm — die Zeitung brachte das nachher in grosser Aufmachung — folgende hübsche Geschichte:

Mit einigen Freunden aus Bulgarien, Rumänien und Jugoslawien fuhr er einmal zu einem Esperanto-Kongress in Jugoslawien. Da die Bulgaren und Serben kein Rumänisch verstanden und umgekehrt, unterhielt man sich in Esperanto. Soss da in einer Ecke ein altes Bäuerlein, die Pfeife im Mundwinkel, und lauschte neugierig herüber. Schliesslich konnte es nicht mehr an sich halten und fragte, was denn das für eine Sprache sei, die die Herren redeten. Gerne gaben sie Antwort: Das sei Esperanto, eine künstlich geschaffene Welthilfssprache, leichter und schneller zu erlernen als jede Nationalsprache und für die internationale Verständigung bestimmt. «Ja, ja,» meinte da das Bäuerlein, «das habe ich mir schon längst gedacht, das wir so eine Sprache nötig hätten». Die Esperantisten waren über diese Aeusserung sehr erstaunt. Dass grosse Philosophen wie Leibniz, Descartes oder Nietzsche weise Aussprüche über die Notwendigkeit einer Welthilfssprache getan hatten, war ja weiter nicht verwunderlich. Aber wie kam dieser einfache Mann dazu? Sie fragten ihn, und er begann zu erzählen. Er sei ein fahrender Handelsmann und reise von Ort zu Ort und von Jahrmarkt zu Jahrmarkt, durch den ganzen Balkan hindurch. Die Reisen mache er mit einem Eselchen, das ihm seinen ganzen Kram befördere. So ziehe er durch Jugoslawien, Bulgarien, Griechenland und Rumänien, sogar in Oesterreich und in Konstantinopel sei er schon gewesen. Ueberall, wo er hingekommen sei, habe er Leute getroffen, deren Sprache er nicht verstand und die ihn nicht verstanden und habe manche Unannehmlichkeit dadurch erlebt. Wenn sein Esel aber in irgendeinem Lande einem andern Esel begegne, dann beschnupperten sich die Tiere gleich und fingen in den höchsten Tönen eine Unterhaltung an, dass es ganz erstaunlich sei. Sein Esel könne sich mit jedem andern Esel auf der Welt verständigen. Und da habe er sich manchmal gedacht: Wenn unsere Esel sich gegenseitig verstehen können und wir Menschen bringen das nicht fertig, dann müssen wir doch noch grössere Esel sein als unsere Esel! »

Die Weltsprachenfrage und ihre Lösung.

In dieser Eselgeschichte kommt recht drastisch zum Ausdruck, wie schlimm es um das gegenseitige Verstehen zwischen Menschen verschiedener Völker bestellt ist. Es ergibt sich ganz klar die *Notwendigkeit einer internationalen Verständigungssprache*. Es gäbe mehrere Möglichkeiten. Einige schlagen vor, irgendeine weitverbreitete Nationalsprache, etwa Englisch, als Weltsprache zu erklären. Dem stehen aber unüberwindliche Hindernisse entgegen. Denn erstens sind alle Nationalsprachen (auch Englisch) so kompliziert und schwierig, dass nur wenige sie bis zur Beherrschung erlernen können, und zweitens würde die Annahme einer nationalen Sprache als Weltsprache dem betreffenden Volke eine solche kulturelle, wirtschaftliche und politische Ueberlegenheit über alle andern Nationen sichern, dass sich das die andern niemals gefallen lassen würden. Wir sehen ja heute im Völkerbund die Rivalität zwischen Englisch und Französisch, sehen auf andern Gebieten Deutsch, Spanisch, Italienisch, Russisch usw. mit Englisch oder Französisch in Wettbewerb treten. — Ein anderer Vorschlag ist der, eine tote Sprache, etwa das Latein, neu zu beleben und als Weltsprache einzuführen. Abgesehen von der Schwierigkeit des Latein (Wer auf dem Gymnasium 9 Jahre lang 6 oder 8 Stunden wöchentlich Latein gelernt hat, kann sich kaum in dieser Sprache frei ausdrücken) fühlen ihm die Bezeichnungen des modernen Lebens. Eine dritte Möglichkeit ist die, aus den Elementen der wichtigsten Kultursprachen in strenger Regelmässigkeit eine künstliche Sprache zu schaffen. Das hat der Russe *Dr. Zamenhof* getan, als er 1887 das Esperanto veröffentlichte.

Das Esperanto.

Die Sprachlehre besteht aus nur 16 Regeln ohne jede Ausnahme, der Wortschatz ist so international, dass ein grosser Teil desselben ohne weiteres verständlich ist. Durch ein sinnvolles System von Vor- und Nachsilben wird erreicht, dass von wenigen Wurzelwörtern nach bestimmten Regeln eine Unmenge weiterer Wörter abgeleitet werden können. Das Esperanto ist, wie 27 Mitglieder der Französischen Akademie der Wissenschaften erklärten, «ein Meisterwerk der Logik und Einfachheit». Es ist leichter und schneller zu erlernen als jede Nationalsprache. Der russische Dichterphilosoph Graf Leo Tolstoj lernte an einem Nachmittag soviel Esperanto, dass er alles lesen und verstehen konnte, und der als Vorkämpfer gegen die internationale Freimaurerei bekannte Jesuitenpater H. Gruber schrieb 1921 in den «Stimmen der Zeit», er habe trotz seines hohen Alters nach etwa vierstündigem Studium eines Lehrbuchs eine katholische Esperanto-Zeitung lesen und verstehen können.

Die Verbreitung der Welthilfssprache.

Das Esperanto ist heute schon weitverbreitet. Etwa 200 Zeitschriften erscheinen in der Welthilfssprache, etwa 6000 Bücher sind veröffentlicht worden. Internationale Organisationen, darunter auch das Internationale Arbeitsamt in Genf und andere mit dem Völkerbund zusammenhängende Institute, verwenden es mit bestem Erfolg. Das Völkerbunds-Generalsekretariat gab einen vorzüglich dokumentierten Bericht über «das Esperanto als Welthilfssprache» heraus, der von der Vollversammlung des Völkerbundes angenommen wurde. Zahlreiche Organisationen bestehen, die der praktischen internationalen Arbeit durch Esperanto dienen. Auch in katholischen Kreisen hat die Welthilfssprache seit langem Fuss gefasst. Die Päpste Pius X., Benedikt XV., und Pius XI. haben wiederholt die Bewegung ermutigt und gesegnet, und zahlreiche katholische Organisationen haben die praktische Brauchbarkeit des Esperanto erproben können.

Esperanto in der katholischen Jugend.

Die *Katholische Weltjugendliga*, deren Anfänge in die Zeit des Weltkrieges zurückgehen und die 1920 in Haag (Holland) endgültig gegründet wurde, hat das Esperanto als offizielle internationale Verkehrssprache angenommen und verwendet es mit bestem Erfolg in ihrer Arbeit, welche die Schaffung von persönlichen Beziehungen zwischen katholischer Jugend aller Länder und die Betätigung im Sinne der christlichen Friedensidee zum Ziele hat. Sie heisst auf Esperanto «Mondjunularo Katolika», abgekürzt auch MOKA, und ist bestrebt, praktische Einrichtungen internationaler Zusammenarbeit zu schaffen. Gerade durch die Verwendung des Esperanto kann der Bewegung eine besondere Einheitlichkeit und Stosskraft gewährleistet werden. Sie sucht auch die Kenntnis des Esperanto als wichtiges Hilfsmittel internationaler Verständigungs- und Friedensarbeit in der katholischen Jugend zu verbreiten. Nachdem sie in der ersten Zeit ihres Bestehens die in Esperanto erscheinenden katholischen Zeitschriften «Blanka Kruco», «Espero Katolika» und «Katolika Mondo» als ihre Mitteilungsblätter benutzt hatte, gründete sie Anfang 1926 die internationale katholische Jugendzeitschrift «La Juna Batalanto» («Der Junge Kämpfer»), die sich mehr und mehr zu einem wichtigen Aussprache- und Nachrichtenblatt internationaler katholischer Jugend- und Friedensbewegung entwickelt hat. — In zahlreichen nationalen und internationalen Verbänden katholischer Jugend wird Esperanto gepflegt; es sei nur erwähnt, dass im Katholischen Gesellenverein etwa 20 Esperantogruppen bestehen, dass in katholischen Jugendblättern vieler Länder Esperantokurse veröffentlicht wurden und Esperanto-Ecken erscheinen. Auch die Friedensorganisationen (in Deutschland der Friedensbund deutscher Katholiken) empfehlen dringend die Erlernung und Verwendung des Esperanto. 1927 gab die *Katholische Weltjugendliga* einen Aufruf «Katholische Jugend und Esperanto» heraus, der zur Erlernung und Anwendung der Hilfssprache aufforderte und von Führern aus nahezu 40 Jugend- und Friedensbünden des deutschen Sprachgebiets unterzeichnet war. U. a. trug er die Unterschriften von Prof. W. Arnold (Präsident der Schweizerischen Baumgartner-Gesellschaft), Kaplan Karl Czech (Reichsbund der katholisch-deutschen Jugend in der Tschechoslowakei), Kurt Döbler (Quickborn), Dr. Nikolaus Ehlen (Grossdeutsche Jugend), Dr. August Hloucha (Oesterreichisches Kreuzbündnis), Generalsekretär Kuno Jörger vom Deutschen Caritas-Verband (Internationale Katholische Union), Studienrat W. Knopf (Friedensbund Deutscher Katholiken), Pfarrer Johannes Liebelt (Katholische deutsch-französische Korrespondenz), Reichstagsabgeordneter Heinrich Krone (Windthorstbund), Maria May (Junglehrerinnenbund), Kaspar Mayr (Versöhnungsbund), Dr. M. J. Metzger (Weisses Kreuz), P. Theophil Ohmeier O. F. M. (Verfasser von «Nie und nimmer wieder Krieg»), P. Franziskus Stratmann O. P. (Verfasser von «Weltkirche und Weltfriedens»), Universitätsprofessor Dr. phil. et theol. et rer. pol. et rer. nat. Johannes Ude (Graz), Carl von Vogelsang (Katholischer Wandervogel), Georg Wagner (Jungmännerverband), Pfarrer Th. Weidner (Kreuzbund), Dr. Zimmermann (Katholischer Gesellenverein). — Auf mehreren Kongressen und Konferenzen der *Katholischen Weltjugendliga*, so im Haag, in Graz, Luxemburg, Konstanz, Lugano, Oxford, Turin, Barcelona, wurde das Esperanto praktisch verwandt, in Deutschland veranstaltete die Liga mehrere Esperantotreffen katholischer Jugend, die besonders der Werbung und der praktischen Übung dienen sollten.

Katholische Esperanto-Literatur.

Wenn auch die katholische Esperanto-Literatur sich durchaus noch nicht mit der systematischen Esperanto-Verlagsarbeit der Kommunisten, gewisser Sekten und anderer Kreise messen kann, so verdient sie doch schon durchaus die Beachtung der Oeffentlichkeit. Es gibt da ein halbes Dutzend Gebetbücher, eine Reihe apologetischer, dogmatischer, kirchengeschichtlicher Schriften, Heiligen-Biographien, die Enzyklopen Benedikts XV. und Pius XI., Darstellungen aus der Missionsgeschichte. Da finden wir die packende «*Lebensgeschichte Christi*» von Giovanni Papini, auf besonderen Wunsch des Verfassers ins Esperanto übersetzt, den Katakomben-Roman «*Fabiola*» von Kardinal Wiseman schon in 2. Esperanto-Auflage, die «*Fioretti*» des Heiligen Franziskus, Romane und Novellen katholischer Autoren, 3 internationale und 7 nationale katholische Esperanto-Zeitschriften. Leider gibt es noch keine katholische Gesamtausgabe der Heiligen Schrift, wohl aber eine vollständige Bibel in der Ausgabe der Britischen Bibelgesellschaft.

Was langen wir mit unseren Esperanto-Kenntnissen an?

Was kann man nun, wenn man die Welthilfssprache gelernt hat, mit seinen Kenntnissen anfangen, und zwar heute schon, nicht erst dann, wenn sich Esperanto einmal allgemein durchgesetzt haben wird? Man kann zunächst durch internationale Beziehungen seinen Horizont erweitern und manches Nützliche lernen. Möglichkeit dazu ist gegeben durch Esperanto-Briefwechsel mit Gesinnungsfreunden in aller Herren Länder, durch Auslandsfahrten, bei denen die Hilfe esperantosprechender Kameraden in Anspruch genommen wird (die grosse *Universala Esperanto-Asocio* mit Delegierten an fast 2000 Orten sowie einige andere Verbände haben solche Dienste vorzüglich ausgebaut und dafür u. a. die besondere Anerkennung des Völkerbundes gefunden). Man kann an internationalen Tagungen teilnehmen, wo Esperanto gesprochen wird, man kann internationale Bücher und Zeitschriften lesen. Man kann vor allem mithelfen, dass durch direkte freundschaftliche Beziehungen zwischen jungen Menschen aller Länder ein Geist internationaler Solidarität und Brüderlichkeit heranwächst, der die Grundlage einer dauerhaften Völkerverständigung bilden muss. Die *Katholische Weltjugendliga* (Mondjunularo Katolika, MOKA), die in über 50 Ländern ihre Mitarbeiter zählt (sie steht unter dem Protektorat des Bischofs von Siebenbürgen und erhielt kürzlich noch den päpstlichen Segen für ihre Tätigkeit) leistet solche Arbeit und kann noch viele Mitarbeiter gebrauchen.

La Juna Batalanto.

